

La Brila Esperantistino

Numero 984
Printempo 2018



Adiaŭ al Marjorie Boulton

Ŝia vivo antaŭ Somerville en ŝiaj propraj vortoj

- 4 · **Adiaŭ al Marjorie Boulton**
- 6 · **La vivo antaŭ Somerville**
Marjorie Boulton
- 12 · **20 horoj ĝis Londono**
Oscar Hughes
- 14 · **Kiu Kiuas?**
Laura Miller
- 17 · **The crow family in English and in Esperanto**
Anna Lowenstein
- 18 · **IJS 2017**
Georgo Ordish
- 21 · **Unua vojaĝo tutsola**
Ian Carter
- 22 · **Prelegvojaĝo de tanzaniano**
Malcolm Jones
- 23 · **La Spesmilo revizitata**
Terry Watts
- 24 · **Jes al JES**
Tyron Surmon, Georgo Ordish
- 28 · **Esperanto-tago en Conwy ege ĝuindis**
- 29 · **Revolucio forgesita**
Eric Lee
- 30 · **Zamenhof revivigita**
Maurizio Giacometto
- 31 · **La granda milito kaj Esperanto**
Bill Chapman
- 32 · **Ludemuloj ludas per Esperanto**
- 34 · **Ilego por Ekparoli!**
Maurizio Giacometto
- 35 · **Neniejaj naskiĝtagoj**
Ian Carter
- 36 · **En la postplua kuniklejo**
Martin S Taylor
- 38 · **Esperanta bebo**
Maurizio Giacometto
- 38 · **Plendoj pri la muzo**
Paul Roberts
- 39 · **Ni ridu**
Ian Carter

redaktis: **Tim Owen**
tim.owen@esperanto.org.uk

eldonis: **Esperanto-Asocio de Britio**
eab@esperanto.org.uk

telefone: +44 (0)1782 372141 aŭ en Britio: 0845 230 1887

retejo: **esperanto.org.uk/lbe**

fasonis: Ava Rowell

enpaĝigis: Tim Owen

limdato por la aŭtuna numero:
31 aŭgusto 2018

ISSN 0007-067X

presis: Panda Press

La Brita Esperantisto kaj EAB Update estas eldonataj entute ses fojojn jare. Artikoloj esprimas nur la opinion de sia aŭtoro kaj ne nepre ian oficialan starpunkton de EAB. Nemembroj povas aĉeti LBE de la EAB-libroservo en Barlastono. Kontribuojn sendu elektronike al la redaktora retpoŝta adreso, redaktoro@esperanto.org.uk

Redaktore

VENAS la printempo, kaj do alvenas nova numero de *La Brita Esperantisto*. Ŝajnis abunde logike komenci ĉi tiun eldonon per raporto, plejparte per fotoj, de la funebra servo de **Marjorie Boulton**, ĝis antaŭnelonge la plej amata vivanta esperantistino. Vi legos en ĝi trafan mesaĝon, kiun laŭtleĝis **John Wells** en la diservo. Estis tamen nia celo ne nur adiaŭi la forpasinton, sed iel renkonti alian ŝin, ĝis nun ne konatan: en sia artikolo *La vivo antaŭ Somerville*, nove tradukita en Esperanton de **Ian Carter**, Marjorie postmorte prezentas sin tia, kia ŝi estis en la junaĝo.

Notindas en ĉi tiu numero la kontribuoj, kiuj rilatas al uzado de Esperanto kaj ĝuado per ĝi. Nuntempa grizharulo retrorigardas sian unan aventuron antaŭ pli ol duonjarcento, apud raportoj de nunaj lernantoj, kiuj lastatempe siajn unuajn paŝojn en Esperantujon faris. Estus por vi interese, ni esperas, vidi kiaj estas internaciaj Esperanto-aranĝoj per ĉi tiuj raportoj: ni esperas, ke ili eble kuraĝigos kelkajn el vi meti la piedfingron en internaciajn akvojn, tute kiel la lastatempa propono de EAB oferti subvenciojn al novaj lernantoj por partopreni la alte rekomendindan lernigan eventon *Someran Esperanto-Studadon*.

Por ĝui Esperanton ne estas devige trovi ion oficialan por partopreni, kiel montras artikolo pri amikaro, kiu

okazigis lud-semajnfinojn. Eble la ekscio, ke ili uzis ludojn presitajn en Esperanto donos al vi la ideon trovi kaj uzi ilin.

DUM pluraj jaroj aŭdeblas plendoj kaj proponoj, ke la enhavo ĉe kongresoj ne tiom permesas al ĉeestantoj mem partopreni programerojn anstataŭ simple spekti. Riceviĝis proponoj, ke oni starigu programeron por ebligi kantadon, muzikumadon ktp. Ĉi tiun jaron, sekve de tiaj komentoj, aldoniĝis programero por fari ĝuste tiel... kaj ŝajne proponis sin neniu. Se vi jes ja volontulis per la aliĝilo ĉe la kongresa retpaĝo, bonvolu kontakti min rekte, por ke mi eksci, ĉu io ĉe ĝi misfunkcias kiam uzas ĝin aliuloj.



LASTE sed ne balaste, ni deziras danki al **Simon Davies**, kiu post multjara deĵorado petis liberigon de la temporaba tasko enpaĝigi la gazeton. La alta kvalito de la lastaj ekzemploj de *La Brita Esperantisto* ŝuldas tiom al Simon, kiom al iu ajn alia. Ni dankplene deziras al li multan feliĉon por lia nova libertempo, kaj esperas unu tagon revidi lin kaj lian talenton. ■

LA FUNEBRAJ ARANĜOJ por **Marjorie Boulton** okazis la 9-an de oktobro en Oksfordo. Komenciĝis la adiaŭado per diservo en la ortodoksa preĝejo, laŭ la deziro de **Maciej Mirnowicz**, kiu prizorgis Marjorie dum ŝiaj lastaj jaroj. Post la enterigo en Wolvercote Cemetery okazis akcepto en la kolegio Somerville.

En la diservo **John Wells** laŭtleĝis el

la Esperanta biblio, eldiris la *Preĝon de la Sinjoro*, kaj parolis en la angla kaj en Esperanto pri la vivo de Marjorie kaj pri ŝia verkaro.

Florkronon sendis EAB kaj la Akademio de Esperanto. Mesaĝon verkitan de **David Bissett** nome de la Esperanto-Asocio de Skotlando laŭtleĝis en la posta akcepto **Ian Carter**. ■



BRIAN MOON

Marjorie, vi estas konata kiel aŭtoro en du malsamaj rondoj: en la anglalingva mondo kiel la aŭtoro de lernolibroj de literaturaj temoj, kiel prelegisto, kiel kolegiestro, kaj pro via oksforda doktoriĝa disertacio pri angla literaturo.

Tamen en Esperantujo vi havas pli vastan renomon, renomon ja tutmondan. Malgraŭ via modesteco, ni metas vin senhezite en la unua rango de verkistoj en nia lingvo. Vi estas elstara poeto, talenta dramverkisto, kaj eminenta biografiisto. Sed vi sciis ankaŭ verki en populara stilo. Plie, vi ne limigis vian Esperanto-agadon al literaturo. Vi donis vin energie

al movadaj taskoj, ĉu publike, organizante kursojn ĉi tie en Britujo, ĉu private, skribante kuraĝigajn leterojn al unuopuloj en plej diversaj lokoj.

Vian literaturan eminentecon oni rekonis elektante vin membro de la Akademio de Esperanto. Hodiaŭ mi havas la honoron reprezenti la Akademion ĉi tie.

Nun, Marjorie, vi kuŝas en la ĉerko. Sciu, ke ne mortis via reputacio kaj viaj verkoj. La tuta esperantistaro ne nur admiras vin sed ankaŭ amas vin. Ni memoros vin por ĉiam.

John Wells



Maldekstre: Parolas **John Wells** en la diservo. Supre: La enterigo.
 Sube: Laŭtlegas **Ian Carter** en la akcepto. Staras maldekstre
Anna Lowenstein kaj malantaŭe **Maciej Mirnowicz**.



MI POVUS ŝerce diri, ke aŭtorecon aŭguris mia unua hejmadreso: 58 Popes Grove, Strawberry Hill, Twickenham. Mi estis pli bonsana ol Alexander Pope, kvankam malpli naturdotita; sed eble Muzo iam vizitetis tiun adreson...

Miaj gepatroj ŝajnis neprobabla duopo. Mia patro estis filo de karboministo, kiun oni multe viktimitis pro lia sindikata agado; lia patrino, fruviva vidvino kun sep infanoj, devis esti malglata diamanto. Kuraĝigite de percepta lernejestro, mia patro post multa strebado licenciĝis pri Historio ĉe la nuna Universitato de Manĉestro, fariĝis instruisto kaj gajnis plian licencion ĉe la London School of Economics. Mia patrino avo estis malgrandampleksa negocisto kaj inventisto en la mondo de ceramikaj bakujoj, tial la familio kreskis en modera komforto. Mia patrino fariĝis instruistino ĉe bazlernejo – tiame apenaŭ edziniĝinta kiam maldungita. Mi opinias, ke ĉi tiuj nekongruaj geedzoj estis nekutime sukcesaj – en dudek jaroj eĉ ne unufoje mi aŭdis kvereli miajn gepatrojn.

Ambaŭ estis entuziasmaj por eduki min. Trijaraĝa mi jam flue legis, ŝategis rakontojn, baldaŭ provis inventi ilin; ŝategis simpligitan historion, facilajn versaĵojn; kiam mia nazo ne ŝvebis super libro mi lernis kiel identigi komunajn florojn, insektojn, birdojn, aŭ ludis image per pupoj aŭ per ludilbestoj. Min ravis veraj bufoj, ranoj, dornofiŝetoj, blankaj

Junaĝan **Marjorie Boulton** neniu el ni konis... ĝis nun. En la jena artikolo Marjorie prezentas sin junaĝan, antaŭ ol ŝi studis ĉe Kolegio Somerville, Oksfordo.

musoj, tamen ne kontentigis la esperojn de mia patro la fakto ke mi ne kapablis kapti pilkon.

Kiam mi estis kvinjara la juro ordonis, ke mi iru al bazlernejo, tiel krampante grandan bremsilon al mia edukado kaj enkondukante min al kulturo de amasrutinoj (ja necesaj kiam temas pri almenaŭ 30 infanoj en la klasĉambro) kaj multego da punbatado. Mi ĉefe evitis punadon per la scioj, kiujn jam provizis miaj gepatroj kaj per konfuzita obeemo. En la krimlisto troviĝis ne nur Parolado, sed ankaŭ Paĝturnado (dum iu malrapide fuŝlegis), Eraroj kaj, pli riproĉinde, Ĝustigoj, instruante al ni, ke provi senerarigi ion estis grave malbonkondukte.

Tamen iun veran servon faris por mi ĉi tiu misedukejo: nigra tabulo evidentigis, ke mi estas miopa; de okulvitroj mi profitegis; multon, kiun al mi mi obeeme bildigis mi nun vidis, kaj foje mi eĉ kaptis pilkon.

Ekestas kompato

En miaj memoroj de la bazlernejo ne inkluziviĝas feliĉaj horoj aŭ momentoj de ekscita lernado; povas esti, ke maljustas memoro. Miaj du unuaj instruistinoj estis

afablaj, laŭ la tiamaj normoj, al ‘bonkonduta knabineto’. Kiam mi estis proksimume sepjara, iu instruistino, vidante iom ploreman infanon en momenta konfuziĝo pro klasĉambroŝanĝo, elektis malami tiun ‘hurlantan infanon’ kaj persekutis min dum monatoj; malofte batante, nur tirante min tien kaj reen kaj prezentante min por ĉies malestimo – bagatelaĵo kompare kun tio, kion oni faras ĉiun tagon al infanoj ĉie en la mondo, sed por mi vunda. Post kelkaj monatoj, ŝi subite elektis alian knabinecon, kiu fariĝu sian malamikon. Senutile, mi sentis min tuŝata; verŝajne en mia menso ekestis kompatio.

Iun tagon, mia patrino ricevis telegramon kaj tre nekutime ĉirkaŭdancis, kriante ‘Paĉjo fariĝas lernejestro!’ Ni translokiĝis al Barton-on-Humber, tiutempe eĉ pli kampara ol ĝi hodiaŭ estas. Efektive mia patro estris malgrandan gimnazion sen punbatado; mi memoras ke el la municipa lernejo eĥis batoj, kvankam mi evitis ilin, lernis iom, kaj gajnis kelkajn geamikojn. Mi memoras, ke mi vagis laŭ la riverbordo de la Humber, fantazianta, plukante sovaĝajn fragojn kaj rubusojn, kaj eklernis la dialekton de Lincolnshire, kiun konis Tennyson. Miaj geamikoj ankoraŭ inkluzivas familianojn de nia afabla kuracisto, kaj mi ŝuldas multon al la bonega tiea dentisto – kiu haltigis sian karieron per tragika murdo, pelite de emociaj dilemoj.

Kiel mi poste komprenis, mia patro estis sufiĉe certa, ke la Naziismo kaŭzos

militon. Li jam servis dum 1914 ĝis 1918, kiel pacisto en ambulancoskipo – kaj gajnis la Militan Medalon. Li volis antaŭenpuŝi mian edukadon, kaj aranĝis, ke mi aliĝu al la gimnazio dekjara prefere al dekonujara. Mi ankoraŭ dankemas.

Tie mi vere komencis lerni ion. La latina kaj la franca estis ĝuigaj; la fiziko kaj la ĥemio (primitivaj laŭ la hodiaŭa vidpunkto) estis pli malfacilaj sed interesaj; la kuirado kun siaj teoriaj iometoj estis interesa, kvankam sen la nuntempa melamino misproportcian onon de ĉiu leciono bezonis frotlavado de lignaj tabloj. Hejmtaskoj fariĝis grava devo. La matematikon kaj sportojn mi malamis. (Tiam ne molaĉa, min plaĉis longaj promenoj en la kamparo, pli sekuraj ol hodiaŭ.)

La unuaj verkoj

Laŭ mia rememoro, estis dum tiu stadio de mia edukado ke plej ĝenis min tiraneco kaj turmentado. Kompreneble, miaj krimoj estis pluraj: mi estis filino de la lernejestro (do, kompreneble, miaj studpoentoj sendube estis falsitaj, ktp); mi fuŝis sportojn; kaj, ŝanĝante la vestaĵojn por atletismaj lecionoj, mi malkovris kion mia patrino opiniis pri subvestoj, al aliaj antikvumodaj. Ankaŭ rilate al normala konversacio mi trovis min limigita: hejme mankis radioaparato, maloftegaj vizitoj al la kinejo, nur por io, kio estus nekontesteble Eduka; min konfuzis la kaŝema fervoro de multaj knabinoj pri ŝminko kaj modoj.

Nun mi lernis multon akademie. Mi

ankaŭ verkis rakontojn, poemojn, teatraĵojn, senvalorajn sed memtrejnajn. Miaj klopodoj inkluzivis du teatraĵojn pri historiaj temoj por datrevenoj de mia patro kaj iun teatraĵon kadre de la Hispana Enlanda Milito. Mi estis evoluiganta fortan intereson pri politiko, kaj mia patro devis averti min ne menciigi aliloke tion, kion mi vidis rilate al senlaboreco, la maljunulino perforte kondukita al la malriĉulejo, socialismo kaj faŝismo; li maltrafis postenojn ĉar oni suspektis lin tro radikala; kvankam dum liaj historiaj lecionoj li ja diris ion pri sindikatismo, kaj mia tre silentema patrino diris ion al mi pri la Suffragettes (aktivulinoj pri virina voĉdonrajto). Sed ne diskutu politikon ekster la domo... Intertempe, la malnovan ĉevalojn malantaŭ nia domo mia patro konvertigis al ŝirmejo kontraŭ aeratakoj, ĝi eĉ havis trarampeblan urĝan elirejon tra spaco kiu antaŭe estis porkejo; li eĉ aranĝis ke oni traportu elektron kaj havis planojn rilate eblajn bezonojn. Li ankaŭ fruis, postulante ŝirmejojn por sia lernejo.

Tamen, en la somero de 1938, konstatante ke tia okazo eble ne revenos dum longa tempo, Patro kondukis Patrino kaj min al Francio. Komence, oni sendis min al Eastbourne por intensa du-semajna kurso en la franca. Ni vidis kelkajn el la Parizaj vidindaĵoj, poste ni restis pli longe ĉe Le Lavandou, tiam unu el la malplej kostaj stacioj sur la Riviero. Mia scipovo de la franca ege pliboniĝis (kaj mi ja rimarkis ke la provenca estis malsama); kaj mia ĝenerala memkonfido

pligrandiĝis. Mi memoras kiom ekscitaj tiam estis lunarkaj bulkoj kaj cikadoj, lacertoj sur muroj kaj omaroj sur teleroj, kokinoj kiuj kolektis panerojn faligitajn de sur tabloj por ŝanĝi ilin al ovojn por niaj omletoj, simpatia Madame (restadejestrino) kaj la Mediteraneo... kaj ke nia gaja kelnero estis itala rifuĝinto de Mussolini. En eta Barton en 1938, eĉ tiom malgrandskala fremda vizito estis sufiĉe prestiĝa.

Sekretaj lecionoj pri verkado

Ĉi tiu sperto faris multon por mi, sed je proksimume la sama tempo nova planedo naĝis en mian konon kun ardo de nova lumo. Iu instruisto volis eduki siajn infanojn en la kamparo, kaj en mian neston de kompetentuloj venis – almenaŭ kiel ĝin vidis adoleskantino – aglo! Vera, fervora verkisto kun eldonitaĵoj – Henry Treece. Li estis unu el la “Novaj Romantikuloj”, amiko de Dylan Thomas, parte reagante kontraŭ la konscie ideologiaj ‘poetoj de la jaroj 30’ (laŭ mia vidpunkto pli bonaj); sed Treece estis aŭtentika romantika poeto, kiu verkis ankaŭ romanojn, rakontojn por infanoj, kaj iom da literatura kritiko. Liaj poemoj eltiris el mi dekkvinjara abundajn larmojn; liaj vivspertoj admiregis min. Li donis al mi multe da ekkomprenoj pri literaturo kaj la angla lingvo, kaj kelkajn konceptojn pri la literatura mondo, pli ĝenerale pri mondo pli vasta ol Barton. Plej grave por mi kiel mi tiam estis, li ja kontrolis miajn poemojn kaj faris signifoplenajn komentojn – jen juste

severajn, jen efektive kuraĝigajn. Tio, kion oni supozis privata instruado pri deviga franclingva teksto baldaŭ fariĝis (la teksto honeste pristudite) sekretaj lecionoj pri verkado kaj pri tiuepokaj verkistoj. Al li mi ŝuldas multegon, kaj mi certas ke li faris pli ol iu ajn por taŭgigi min al universitataj taskoj. Li kapable gvidis lernejan enscenigon de *The Knight of the Burning Pestle* (La Kavaliro de la Brulanta Pistilo – mi rolis kiel malbona patrino) kaj kuraĝigis min kiam mi enscenigis mallongan satiron pri nia deviga teksto *Macbeth*, kaj pri nia lernejo Macmannin; la timema knabino komencis amuzi kaj amuziĝi...

En la jaro 1939 miaj samklasanoj kaj mi trapasis gravegan ekzamenon, tiam nomita la School Certificate (Atestilo pri Baza Edukado), atingante Krediton en Matematiko kiu estis esenca por aliĝo al universitato, Krediton en Ĥemio kaj Distinction (Honoro) en ĉiu el miaj ses aliaj studobjektoj, la universitato ŝajnis farebla. Grandanime kaj prudente mia patro akceptis, ke mi preferas studi la anglan, kvankam li fakte revis pri Historio.

Edukadon milito ne haltigas

Sed je la 3a de septembro, hejme, ni aŭdis la atenditan militanoncon. (Mia patro fine aĉetis radioaparaton, ‘ĉar povus esti ke ni bezonos aŭdi urĝan instrukcion registaran’.) Mi memoras, ke de nia korto ni vidis la gigantajn barajbalonojn super la urbo Hull, kaj ke en nia pretigita ŝirmejo ni metis litkovrilojn, biskvitojn,

multajn agrablaĵojn, kaj pendigis la kontraŭgaskurtenon malantaŭ la pordo... Ĉar ĝi situis en ‘neŭtrala loko’ Barton spertis nek evakuadon nek evakuitojn, do la edukado daŭris sufiĉe normale kun detaloj tiaj, kiaj porciolimigo, gasmaskoj, aerataka provtrejnado, kaj makabraj novaĵbultenoj.

Malgraŭ timoj, miaj jaroj en la Sesa Klaso estis ĝenerale feliĉaj; tiuj, kiuj tiranis min, jam foriris kaj ni ĉiuj atentis pri niaj preferataj studobjektoj; mi trovis min inter gejunuloj aspiraj, intencaj, amikaj. Ravita de Virgil kaj Voltaire, sorbante Shakespeare, eklegante la modernan romanon (mankis librejo en Barton, kompreneble, sed la loka apotekisto povis mendi kelkajn Penguin-librojn per mia preskripto!) mi ĝuis verki por miaj geamikoj, kaj ankaŭ serioze. Leginte *The Prince* de Machiavelli, mi verkis *The Prefect*; post io de Hugo, ŝercan versan melodramon, kiu aludis nian grupon. Post novaĵbultenoj fantaziaĵon en kiu rolis Winston Churchill. Henry Treece daŭre helpis pri mia serioza verkado, ĝis li aliĝis al la R.A.F.

En la unua jaro de la Sesa Klaso, pro sugesto de mia patro, mi provis Ekonomikon – sukcesis, sed sen gloro.

Intervjuo en Oksfordo

Mia patro kolektadis informon pri aliĝo al universitato por siaj sesa-klasanoj; ĉu Oxford estis nur revo de patro? Li estis aktiva – demandis al Somerville ĉu ni eble povus provi ilian aliĝekzamenon. Li trovis

la paperojn timindaj; dank' al Treece kaj al la lerneja biblioteko, mi efektive ĝuis ilin – kaj oni alvokis min por intervjuo. Trajnoj estis plenaj je soldatoj; mi neniam antaŭe vojaĝis tutsole; mia patro akompanis min, trovis por si mem liton en Oxford, kaj la postan matenon sciigis min pri lia ekscita bonŝanco – vera, freŝa ovo por la matenmanĝo!

Por mia intervjuo, mi metis mian plej bonan robon, kaj tre karakterize glitis peze en la Korto kaj ŝiris ĝin preterripare, do mi frontis plurajn imponajn renkontiĝojn en vestaĵoj trajn-ĉifitaj. Sed ĉi tie oni spektis mian menson.

Malgranda Ekspozicio (ne tiu kiun mi montris en la Korto) tre mirigis mian patron eĉ pli ol la ovo. La urĝa tasko estis nun trovi la restaĵon de la bezonata mono, per gajno de State Scholarship (Ŝtata Stipendio). Mi dubas, ĉu mi iam laboris pli multe en mia vivo ol kiam mi laboris en 1940-41 por la Higher School Certificate (Atestilo pri Supera Edukado).

Ek al Somerville

Milita celo Barton apenaŭ estis, sed transrivera Hull ja estis. La plimulton de la noktoj ni plonĝis en nian ŝirmejon. Sirenoj, bomboj, lumĵetiloj, aviadiloj, kontraŭaviadilaj pafiloj, multe da ŝrapnelo falanta en nian korton, negrava rompadado de niaj vitroj, dieto plimalboniĝanta sed ne katastrofa... teruraj vidaĵoj de Hull brulanta, aĉaj detaloj el nia nova radioaparato... Kompreneble, ni estis relative bonŝancaj, nekredinde tiaj en komparo kun la plejparto de Eŭropo. Por

sesa-klasanoj proksimiĝis konskripcio. Eĉ mi gardis sencon proporcion kiam ni devis mortigi nian familian katon pro tio, ke li rifuzis manĝi ion ajn, kiun ni nun povis trovi por li. La plejmulto de ni kiuj preparis nin por ekzamenoj provis ie fari ian bagatelan servon. Nia malgranda kampara Sesa Klaso estis benigna fratularo. Ni sciis, ke ni estas bonŝancaj; ni sciis pri la teruraj eblecoj.

Iom pli malgrave, atendi ekzamenrezultojn estis streĉe. Mi gajnis Distinction en ĉiuj miaj studobjektoj, kaj County Major Scholarship... ne sufiĉis. Jen unu matenon mi ekprenis tre malhelaspektan brunan koverton kaj mia ekkrio allogis mian patron malsupren. Mi opinias ke, inter ĉiuj timoj kaj streĉoj ankaŭ li havis momenton ekstazan.

Do ek al Somerville! Pluraj pluaj militepokaj limigoj, kelkaj devigaj militservoj, multaj malvarmegaj lokoj, senlumeco kaj dubinda dieto...

neimagita libereco de parolo kaj diskuto
neimagita kvalito de laboro
torentoj da lumo sur niajn studobjektojn
diversspecaj mirindaĵoj de amikeco...

Dum kelkaj jaroj mi dubis, ĉu vere estis vivo antaŭ Somerville. ■

Origine publikigita en *Somerville Magazine*, kiu afable donis permeson traduki ĝin. Elangligis **Ian Carter**.

Marjorie Boulton, ĉe sia amata Kolegio Somerville okaze de sia 90-a datreveno, kun **Alice Prochaska**, ĝia tiama ĉefulino.



KVANKAM mi konscias la ekziston de Esperanto ekde infanaĝo, nur ĉi-jare ekflamis iu interesiĝo pri la lingvo kaj mi decidis komenci lerni ĝin. Motivis min pluraj aferoj, ekzemple mia scio, ke Esperanto estas ĉefa lingvo en la plurlingvula komunumo. Mi ankaŭ jam konis la prelegon de Tim Morley ĉe YouTube pri instruo de Esperanto en bazlernejoj, kaj legis artikolojn de profesoro Wim Jansen pri lingvistikaj aspektoj de Esperanto. La malkovro de *Pasporta Servo* finfine decidigis min.

Mi rapide faris retan kurson *Lernu Esperanton ene de 12 horoj* kaj poste legis gramatikpriskribon kaj serĉis kelkajn centojn da ofte uzataj vortoj en la vortaro. Post tri semajnoj, proksimume 15-20 horoj, da studado mi decidis provi

Malpli ol 20 horoj da studado sufiĉas por renkonti kaj ĉiĉeroni spertajn esperantistojn, ĉu ne? Ŝajnas, ke la respondo estas jes, kiam la lerninto estas **Oscar Hughes**.

Esperanton-rekontiĝo kaj kontaktis la bonfaran asocion NoJEF por subvencio.

La unuan tagon ni renkontiĝis en la metrostacidomo Westminster kaj piediris al St James's Park, kie ni piknikis. Mi jam aŭdis, ke multaj esperantistoj, aŭ almenaŭ tiuj, kiuj ofte partoprenas kunvenojn, estas tre korligitaj, kaj la unua momento de la renkontiĝo konfirmis tion. Feliĉe ĝi ankaŭ bele montris, ke la spertaj parolantoj tre ŝatas ekkoni novulojn.

Post la pikniko ni piediris al la Brita



Pikniko
Marten

Muzeo, kaj mi montris al franca esperantisto, kiu ne konas Londonon, la muzeon, precipe la plej ŝatatajn kaj konatajn sekciojn, kiel la egiptajn mumiojn kaj la ŝtonan platon de Rosetta.

Poste ni manĝis ĉe Wetherspoon's — laŭdire longtempa tradicio ĉe JEB-renkontiĝoj — kune kun kelkaj anoj de la Londona Esperanto-Klubo. Mi tre ŝatis aŭskulti **Lenion Marobin** paroli pri la abundeco de la vortprovizo de la lingvo dum la unua duono de la 20-a jarcento kaj pri la historio de la lingvo pli ĝenerale.

Ariel Bonkorpa parolis pri siaj spertoj en Japanio, kie ŝi loĝis ĉe esperantistoj, kiujn ŝi trovis per *Pasporta Servo*. Mi interparolis ankaŭ kun hungara esperantisto, kiu nuntempe studas en Londono, kaj kiu konas multajn denaskulojn pro tio, ke li lernis Esperanton, kiam li estis nur 15-jaraĝa — la plejparto de la junaj esperantistoj en Hungario estas denaskuloj.

Mi jam legis artikolojn pri la eraroj komunaj ĉe Esperanto-denaskuloj kaj pri la dubo, ĉu ekzistas veraj denaskuloj pro tio, ke ili lernas Esperanton ĉefe izolate de Esperantujo, do ilia Esperanto estas forte influita de la gepatroj kaj aliaj lingvoj. Sed eĉ se ne estas veraj denaskuloj kaj se sekve mankas la plej fina lingvosento, la lingvo transformiĝas, kaj ne nur vortprovize, sed ŝajne ankaŭ buŝe. Mi aŭdis multajn ĉeestantojn prononci 'kiŭi'

anstataŭ 'kiuj', kiu, Ariel klarigis al mi, estas faciligo de la prononco, sed kiu malobeas la fonetikan principon de Esperanto.

La duan tagon ni rekontiĝis ĉe Hampstead Heath, promenis, piknikis kaj manĝis en picejo. Mi demandis al aliaj ĉeestantoj, ĉu ili opinias, ke la nombro de esperantistoj kreskas aŭ malkreskas. Ŝajnis al mi, ke unu de la kialoj pro kiuj oni ne scias, estas ke multaj esperantistoj, lerninte la lingvon rete, nek estas nek volas esti aktivaj en la movado, aŭ almenaŭ en la tradicia movado.

Alia interesa diskuttemo estis ĉu Esperanto eble estas la unua lingvo, kiun oni povas vere ellerni per Duolingo. Saŝa kaj Magnus parolis iomete pri sia sperto instrui Esperanton en Londono, ofte al lernantoj, kiuj komencis lerni per Duolingo. La unuan tagon venis iu, kiu lernis per Duolingo, sed neniam parolis antaŭe. Komence li malfacile parolis, sed poste parolis sufiĉe flue por babili, eĉ se envenis multaj anglalingvaj strukturoj.

Entute, mi povas diri, ke mi ekkonis afablajn homojn kaj tre ĝuis la semajnfinojn, tiel ke mi senhezite decidis reveni en Esperantujojn. Esplorado sciigis al mi la ekziston de la *Internacia Junulara Festivalo* en Italio, kaj NoJEF tre afable konsentis oferti al mi subvencion por ebligi al mi partopreni. Kaj post unu semajno da profundiĝo en Marina di Ascea, mi estos preta por paroli kun *vi* ĉe la Brita kaj Tut-Kelta Kongreso en Aberystwyth, evento kiun mi avide antaŭĝuas. ■

...kas en St James's Park (maldekstre-dekstren)
...o Miniĥ, Marcus Richardson, Saŝa Murr, Magnus
...Henoch, Oscar Hughes kaj Kat Newbould.

Kiu kiuas ... en la brita Esperanto-movado?

Laura Miller

Saluton, Lajo! Estis por mi neatendite ekscii, ke vi lernas Esperanton per Duolingo!

Neniam estas tro malfrue komenci uzi novan teĥnologion. Mia patrino kaj mi regule uzis Skajpon por interparoli — kaj ŝi estis 84-jaraĝa, kiam ŝi unue provis! Mi ĝojas, ke per tiaj novaj rimedoj multaj homoj nun eklernas Esperanton kaj ke EAB sukcesas atingi ĉi tiujn novulojn.

Fakte mi celis tion, ke vi jam havas sufiĉe da sperto de Esperantaj, do nova lernanto vi ne estas!

Nu, estas vere, ke la nuna ne estas la unua okazo, kiam mi lernas Esperanton. En pasintaj jaroj mi estis aktiva en SATeB (la brita filio de *Sennacieca Asocio Tutmonda*) kaj eĉ dummomente redaktis ĝian gazeton *La Verda Proleto*. Sed dum multe da tempo mi apenaŭ uzis la lingvon, do mi refoje studas.

Kiel via nuntempa sperto ĉe Duolingo kompariĝas al aliaj

Kandidatas por la administra komitato de EAB **Laura Miller**, afabla virino apenaŭ vidata en brita Esperantujo dum kelkaj jaroj.

Tim Owen babilis kun Lajo por doni al ŝi la okazon prezenti sin al vi. Agrablan ekkonatiĝon!

rimedoj, kiujn vi uzis?

Mi estis dum jardekoj amiko kun **Ken Keable**, denaska esperantisto, kaj lia edzino. Mi tre interesiĝas pri lingvoj (kiam, ekzemple, mi estas sur Kubo mi tre facile babilas kun homoj en la hispana) kaj petis, ke li instruu min. Do ioman scion superecan mi antaŭe ricevis de li. Mi komencis lerni pli formale per *Teach Yourself Esperanto*, kiun mi ne alte taksis, kaj poste per *Jen Nia Mondo*, kiun mi multe pli ĝuis.

Ĉe Duolingo mi konstatas kelkajn plibonigindaĵojn. Ekzemple, ĉar mi uzas ne surtablan komputilon sed platkomputilon, ne eblas por mi legi gramatikajn notojn, ĉar tiuj ne disponeblas al uzantoj de etaj ekranoj. Mi tre feliĉas, do, ke mi havas privatan instruiston, la tre ĉarman kaj helpeman **Ian Carter**. El ĉiuj lerniloj, li estas la sola, kiu iam sukcesis komprenebli al mi la akuzativon!

Ni aktuale esploras kun Duolingo la eblon sciigi ties lernantojn pri niaj aranĝoj ĉe meetup.com. Ambaŭ flankoj konstatas la utilon doni al Duolinganoj manieron uzi Esperanton parole.

Ho, **meetup.com** mi uzas por humanisma grupo en Londono! Tio estas alia intereso mia; mi estas sekulara

celebranto por judoj — la sola en Eŭropo! Tion vi ne atendis, ĉu ne? Ĉu vi volas ekscii pri plia neatenditaĵo? Mi iam instruis Esperanton en lernejo!

Kial vi sukcesis fari tion estante mem freŝbakita?

Estas vere, ke mi instruis, kion mi mem ĵus lernis, sed tio ne gravis, ĉar la infanoj mem ne konstatis tion! Temas pri loka bazlernejo, kie mi volontulis kiel sekretario por la estraro. Unu tagon mi babilis kun la lernejestrino kaj rakontis, ke mi lastatempe eklernis Esperanton. Tuj ekbrilis ŝia vizaĝo: en ŝia junaĝo en Jamajko estis regula duonhora radio-elsendo en Esperanto! Do ŝi petis, ke mi, la nova lernanto, instruu ĝin en la lernejo, kion mi faris dum unu jaro.

Mi havis naŭ studentojn kaj fine de la jaro ni faris etan teatraĵon antaŭ iliaj amikoj. Jam 42 lingvoj estis parolataj inter la infanoj; Esperanto fariĝis la 43-a, kaj aldoniĝis la vorto ‘Saluton!’ al la listo de diverslingvaj salutoj ĉe la enirejo. Tiom fieraj estis miaj studentoj! Malfeliĉe eblis fari tion nur dum tiu unu jaro: post disputoj kun la ĉefa estrarano, ĉi tiu tre afabla kaj kuraĝiga lernejestrino demisiis.

Vi jam estis sperta instruistino, ĉu ne? Tio sendube helpis.

Jes, mian tutan laboristan vivon mi pasigis en la edukado-kadro. Mi komencis

instrui la anglan en Nov-Jorko. (Jes, mi estas usonano, sed jam loĝas en Britio ekde 1968. Temas pri la kutima rakonto: mi enamigis, kiel li; sed li al versio pli juna, pli bela. Ĉiaokaze, mi decidis resti.)

Intertempe mi instruis la anglan kaj historion, magistriĝis (trifoje!) kaj doktoriĝis. Post emeritiĝo mi daŭre instruas, precipe al junuloj per Skajpo.

Mi ankaŭ instruas kadre de programo de mia sindikato, kiu celas helpi al enmigrintoj kaj rifuĝintoj, kiuj ne regas la anglan. Ial granda proporcio parolas la hispanan, do mi estas utila por tiu programo, ĉar mi povas instrui al ili la anglan per la hispana. Tio estas tre plaĉa okupo por mi; kiam oni havas la rimedojn fari ion por helpi al homoj en malagrabra situacio, oni faru ion por helpi, por pliagrabligi la vivon, ĉu ne?



Ion tian vi faras ankaŭ sur Kubo, ĉu ne? Vi jam donis la impreson, ke vi estas ofta vizitanto.

Mi vizitas la insulon ĉiun januaron kaj loĝas ĉe tre amikema familio. Jam tio estas tre longa tradicio! Mi estas plimalpli homa valizo, ĉar mi kunportas lernilojn: librojn, filmojn ktp. Pro la embargo la instruistoj havas malmultan aliron al instrumaterialoj do estas eta kontribuo, kion mi povas fari.

Denove temas pri la angla, sed mi promesas, ke estas kaŝita ligo kun

Esperanto: sur Kubo kuracistoj estas devigataj lerni la anglan. Nu, instruisto de la angla ĉe la medicina universitato estas ankaŭ la estro de la Esperanto-klubo en Havano.

Do, vi havas kontaktojn kun esperantistoj sur Kubo?

Ne nur kun esperantistoj sed ankaŭ kun senhejmaj hundoj. Mi tre ŝatas la kubanojn, sed ili ne ĉiam traktas bone bestojn, do mi faras iom da volontula laboro por okupiĝi pri ĉi tiuj kompatindaj bestoj. Sed jes, kun la lokaj esperantistoj mi pasigis iom da tempo.

La insulo klare havas specialan lokon en via koro. Kiam tio komenciĝis?

Io pri Kubo pensigas min pri mia infaneco. Mi ne scias, ĉu vi rekonas la nomojn, sed Julius kaj Ethel Rosenberg estis konataj nomoj dum mia junaĝo. Kiam mi estis ses-jara, ĉiam ili

En la supra foto Lajo vizitas la monumenton sur Kubo memore al Julius kaj Ethel Rosenberg.

En la antaŭpaĝa foto Lajo staras kun la familio, kiu gastigas ŝin dum ŝiaj vojaĝoj al Kubo.



menciigis en la novaĵ-elsendoj. Temas pri geedzoj, kiujn la registaro en Usono akuzis pri ŝtatperfido, ke ili vendis nukleajn sekretojn al Sovetio. Ĝenerale oni havis dubojn pri la konkludo, ke ili estas kulpaj. Tio okazis en plena epoko-McCarthy kaj ili estis ekzekutitaj.

Poste evidentiĝis per la skribaj atestoj, ke la ŝtato promesis al la edzino liberon, se ŝi kulpigus la edzon, kaj tion ŝi ne faris, sciante, ke li ne estas kulpa. Post la disfalo de Sovetio disponeblis la arĥivo kaj fariĝis sciante, ke Sovetio tiujn nukleajn informojn jam havis. Ambaŭ homoj estis maljuste mortigitaj (mi opinias ĉiel la mortopunon abomenaĵo malaperigenda) kaj du infanoj mia-aĝaj fariĝis orfoj. Ili starigis honore al siaj gepatroj fondaĵon por subteni infanojn de politikaj malliberigitoj. Ĝin mi subtenas per monataj donacoj.

La ligilo kun Kubo estas, ke ĝi estis la sola lando, kiu starigis monumenton al la gepatroj. Kaj mi memoras, kiam mi unuafoje prezentis florbukedon al ĝi. Mi ekploris, sed estis tiel emociita, ke mi eĉ ne sciis, ĝis rimarki, ke estas malsekaj miaj vangoj.

Do, jes, specialan lokon ĝi ja havas. Kaj mi celas, kiam mi reiros januare, povi babili kun la lokaj esperantistoj ne en la hispana kiel kutime, sed ĉi-foje en Esperanto mem! ■

The crow family in English and in Esperanto

Anna Lowenstein

WHAT is the difference between a crow and a raven? In Esperanto, ‘crow’ is *korvo*, but how do you say ‘raven’? According to Wells’s dictionary, ‘raven’ is simply (*granda*) *korvo*. In fact there is no real difference between crows and ravens. The crow family is an extensive one, widely distributed in all continents, and several of the larger species of crow are known as ravens in English. So *korvo*, *granda korvo* or *korvego* are all suitable translations in Esperanto for the English word ‘raven’.

One of the largest types of crow is the common raven, which is *nigra korvo* or *korako* in Esperanto. The Esperanto word *korako* refers specifically to the common raven, but as we have seen, various types of crow may be called ravens in English. *Korako* would not be the correct term for these.

Other members of the crow family, all with black plumage in various shades, are the rooks and the carrion crow. The rook is *frugilego* or *kampokorvo* in Esperanto. *Frugilego* comes from its Latin name *frugilegus*, which means ‘fruit gathering’. The carrion crow is *korniko* in Esperanto.

What about jackdaws and magpies?

Anna Lowenstein prezentas ene de nur kelkaj vortoj la familion korvan. Por faciligi la klarigadon, ni prezentas ŝian esploradon anglalingve.

Both are known in popular culture for being attracted to bright objects and stealing them to decorate their nests. Jackdaws are among the smallest members of the crow family, and Wells translates their name as *korveto* or *monedo*. Jackdaws are black, but magpies have distinctive white and black plumage. Their name in Esperanto is *pigo*.

Don’t confuse *pigo* with *pego*, a woodpecker (which is not, by the way, a member of the crow family). It is easy to remember the difference, as *pego* sounds similar to the second syllable of the English word ‘woodpecker’, while *pigo* has the i of ‘magpie’.

And what is a jay? This is another member of the crow family, rather more colourful than the others, with numerous species, some of which are related to the magpies. Wells gives *garolo* for this bird.

Lastly I will mention one more bird which because of its black plumage (at least in the males) might be thought to be a member of the crow family, but in fact belongs to the thrushes (*turdoj*). This is the common blackbird or *merlo* in Esperanto. ■



TROVIĜIS mi en IJS, okazaĵo malstreĉa kaj persona. Plenis sed, plejparte, trankvilis la programo. Bela varma vinvilaĝo, Gyenesdiás, bonvenigis nin, grupon de ĉirkaŭ sesdek junuloj kaj jankoruloj. La IJS-ejo mem foris nur 300 metrojn de la dolĉakva, sed ŝajne kotakva, Lago Balatono.

Malgraŭ tio, ke bruna akvo ne elsendas allogecon, ege popularis akvamuzo en la Balatono. Krom tiu bruneco vere belis la strando. Ĉirkaŭis onin bela herbo, fajna sablo kaj feliĉaj homoj. Eble sufiĉus tio, dum la tago, kiel naĝkialo sed la ada ŝvitigo de la hungara suno donis preskaŭ nekontraŭeblan kialon por enakviĝi. Dumnokte, ne brulis suno, ne ĉeestis homoj kaj ne videblis la ĉirkaŭa beleco, sed daŭre ennaĝindis la lago. Eĉ pli ol tage, fakte. La varmon daŭre iom tenis Balatono kaj, post taga aktivo, nokta trankvilo plaĉas.

Krom strandumado, kompreneble grava parto de la programo, multo pretis por nin amuzi. Ne evidentiĝis tio de la unua nokto. Tiam mi spertis nur malaktivan gustumadon de diverslandaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Kiel sola reprezentanto de Britio, alportis mi la skotan disfaleman biskviton 'shortbread'. Ĝi ne estas la plej interesa manĝaĵo, tamen ĝi britas kaj ĝi pli facile kunportebblas en aviadilo ol 'fish & chips'. Ŝajne mia kunporto sukcesis: mi aŭdis nenium plendon pri la manko de britaj manĝaĵoj.

La 27-a *Internacia Junulara Semajno* okazis en la hungara vilaĝo Gyenesdiás. Partoprenis ĝin **Georgo Ordish** pere de subvencio de la Norviĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo.

Ekis la amuzo marde. Matena jogo bedaŭrinde ne ĉeestebilis pro la mateneco. Sed okazis malpli frue rokodanca kurso por komencantoj. Ĝuinda certe sed verdire mia dancado nomindas fiaskado. Revas mi, ke ĉeestinte sufiĉe da Esperanto-aranĝoj kaj la tieaj danckursoj mi iĝos, iam, pli ol komencanto.

Plej mirindis, tiunokte, la kinejo. Ni spektis ĉarman hungaran desegnofilmon, Szaffi, tradukitan de ĉarma hungara desegnofilmŝatanto, Saci. Malmulton, el ajna lingvo, mi mem tradukis, sed rapide evidentiĝis la malfacileco, kiun prezentas traduko de ŝercoj. Tamen jen filmo ridiga kaj amuza kaj jen traduko sama. Nuras kiel plendo ke mi, kaj aliaj, ne povis legi ĉiujn liniojn sufiĉe rapide, sed pri tio kulpas ni.

Aktivecis merkredo multe pli ol la aliaj tagoj kaj nia ekskurso tuttagis. Komence ni gvidiĝis tra muzeo super groto. La gvidisto plejparte sukcesis interesi sed ŝajne la afiŝego pri grotaj rokoj kaj ŝtonaj formaĵoj interesis lin iom pli ol liajn gviditojn.

Sekvis la gvidadon filmeto tridimensia, kiu kaj montris la naturan belecon de la Tero kaj, pli grave, donis



dormotempon al tiuj, kiuj malmulte dormis la antaŭan nokton.

Edukite pri rokoj kaj grotoj, eniris ni finfine rokan groton. Laŭ la grotisto, ni nek rajtis nek povis vidi la plej belan groton, ĉar ĝi foris tro kaj atingebliis nur por spertaj grotgrimpestoj. La nia ne malbelis do nur malmulta plendo aŭdeblis kaj tute estingiĝis ĝi ekde la boatumado tra engrota lageto. Post ripozo tagmanĝa reekskursis ni malsamdirekten, ĉi-foje al monteto.

Nin avertis la organizantoj matene, ke oni portu malvarmaĵojn pro suno kaj grimpadado. Do jen mi ĝinzon kaj longan ĉemizon portanta kaj varmon sentonta. Belis la vojo kaj akvon ni trovis sufiĉe ofte, do la varmo ne sukcesis aĉigi la

sperton. Multa paŝado pasis kaj ni atingis pinton. Kelkaj finmanĝis siajn dolĉaĵojn de la pakmanĝo. Ni trankvilumis, ni fotiĝis kaj fine ni reekis por atingi la veran pinton, ĉe kiu troviĝas observo-turo. De la turossupro, pejzaĝas la tuta ĉirkaŭo kaj aŭdeblis *La Espero*.

Plena tago tia postulas iom pli trankvilan sekvan tagon. El kartludoj, aligatorado kaj koncerto konsistis ĵaŭdo. Du lokaj muzikistoj alvenis por danciĝi nin per anglaj konataĵoj kaj intermiksitaĵ hungaraj kantoj. Ĝuis mi ilian muzikon, sed rimarkis mi ion, laŭ mi, strangan: pli multis la klavaroj ol muzikistoj. Ĉiuokaze, la muziko bonis, la homoj dancis kaj la nokto sukcesis. Escepte sukcesis la nokto, ĉar jam je la koncertofino ili dankis la



aplaŭdadon per nia bela lingvo. Plena Esperantiĝo baldaŭas certe.

Ial oni decidis, ke jam ne sufiĉe dum IJS drinkas la anoj; tial necesis ekskurso al vingustumado. Por soifiĝi, la vendredo komenciĝis per piediro mallonga sed varma. La surmonteta celo, Laposa, estis vinejo beleta de familio. Estis verdaj kampoj de vinberoj ĉiudirekte. Sed nia atento celis la vinon, fromaĝon kaj aliajn manĝaĵetojn. La interkonan programeron de la unua nokto mi maltrafis, sed sentis mi, ke vingustumado estas bona anstataŭaĵo. Post kelkaj glasoj, la parolado eĉ iom trois kaj ne sufiĉis tempo por kaj drinki kaj paroli antaŭ ol alvenis nova vino.

Ĉi-foje nia ekskurso nur duontagis kaj do restis vespernokta amuziĝo. Tri-partan tri-teaman konkurson kaj sekve kvizon donacis al ni la organizantaro. Unuaparte, enigmojn poemformajn ni ricevis. Por pliajn poentojn havi ni devis pli rapide solvi ol la aliaj teamoj. Due prezentiĝis fadena grandtrua reto tragrimpenda. Sentuŝa tragrimpo gajnas poentojn. Pli facilaj truoj malpli valoris. Tria estis iu ludo iom kiel *Articulate!* kaj iom kiel ŝarado: kiel eble plej longe, ne spiras teamano dum alia teamano prigestas aŭ priparolas vorton post vorto kaj ĉiu alia teamano provas diveni, kiuj



estas la vortoj. Ju pli oni ĝuste divenas, des pli da poentoj oni ricevas.

Fininte tion, ni pretis kviziĝi por gajni pli da poentoj kaj trovi la venkantojn (jam forgesitajn). Nekredeble malsimplis kaj tute ne klarigindas la kvizo, kiu temis pri fikcio ĉia kaj enhavis kelkajn demandojn facilajn, sed pli multajn malfacilajn.

Rapide alvenis la fintoĝo de la IJS, sed ne sen kulmino taŭga. Por senmonaj esperantistoj ne vere ĝuindus tradicia kazino. Tamen paperpeca IJS-mono al ĉiu IJS-ano haveblis. Tiun monon oni

vetis diversmaniere. Kelkaj pri ĉu disfalis la ĝengo-turo, kelkaj pri ĵetkuboj kaj kelkaj pri iu kapbata frenezaĵo. Tamen por mi pokero bonis por rapide gajni

IJS-monon. Bedaŭrinde, ĝi ankoraŭ pli bonis por perdi tiun monon. Fine de la kazino, la freŝaj riĉuloj povis elspezi sian monon per aŭkcio de donacitaj objektoj. Inkluzivis kukoj, libroj kaj diversaj Esperantaj sektaĵoj.

Finis la nokton DĴ Kunar per internaciaj furoraĵoj. Fruega morgaŭa foriro enlitigis kelkajn, sed pli ofte la frueco estas kialo por ne dormi. Post la nedormado iĝis certaĵo, la festemo pli sentiĝis, la amuzado adis kaj ni dancis ĝis la nokto-nokto-fin'. ■

FINSTUDINTE la kurslibron *Teach Yourself Esperanto* post nur tri monatoj, mi ege ekscitiĝis, kaj apenaŭ povis teni min. Mi volis uzi la lingvon kun aliaj esperantistoj el aliaj landoj.

Mi baldaŭ malkovris kulturdomon en Francio — la faman *Kastelon Grezijono* — kaj rapide aliĝis al studkurso dum la venonta somero (1967). Mi eĉ decidis festi mian 17an naskiĝdatrevenon ĉe la kastelo.

Tamen, post nelonge, mi komencis dubi. Ĉu la kulturdomo vere ekzistas? Ĉu mi atingos tiun lokon kaj trovos neniun tie? Ĉu mi perdos la monon, kiun mi jam pagis? Dum la tagoj preterpasis, mi pli kaj pli timemis.

Sed finfine mi pli kuraĝiĝis, kaj zorge aranĝis mian unuan trajnvojaĝon tutsolan.

Mi fakte atingis la urbon Angers (prononcu: 'On-ĵe') ĉirkaŭ la dekan vespere, kaj trovis — je mia hororo — ke je tioma horo mi povas nek telefoni al la kulturdomo, nek preni aŭtobuson, nek serĉi tranoktejon. Krome, kvankam mi atingis la celurbon, mia valizo ankoraŭ ne



Ian Carter rememoras sian unuan eksterlandan vojaĝon antaŭ pli ol duonjarcento. Ankoraŭ hodiaŭ okazas kursoj en Grezijono.

alvenis! Do, kion fari? Mi etendiĝis sur benko ekster la stacidomo, kaj provis dormi. Feliĉe, la somera vetero estis sufiĉe ĝentila.

La postan tagon mi sukcesis telefoni, kaj trafis la aŭtobuson ĝis Baugé (prononcu: 'Bo-ĵe'), de kie oni veturigis min al la kastelo. Kaj mia valizo? Ĝi alvenis post du tagoj!

Mi kontentas rakonti, ke la studkurso estis tre ĝojiga. Dum la libertempo posttagmeza, fojfoje ni promenis ĝis la prahistoria dolmeno, kaj vespere mi ludis la pianon dum la aliaj kantis. Unu tagon mi prelegis pri mia hejmurbo — ĉefe pri ĝia fama preĝejo, kiu havas tordiĝintan turpinton — kaj spertis emocian konflikton: kvankam mi amas mian hejmurbon, tamen mi tre bedaŭris, ke mi devas hejmeniri!

Mi tiom ĝuis la dusemajnan kurson, ke mi decidis reiri en 1968, en kiu jaro mia prelego temis pri la florpotenco kaj la hipioj. Mi eĉ havis longan hararon, kvazaŭ mi mem estus hipio.

Per subvencioj, kiujn EAB nun havebligas por *Somera Esperanto-Studado*, mi esperas, ke pliaj novuloj ĝuos tian sperton, kian mi travivis dekkelkjaraga. ■

LEGANTOJ eble memoras mian artikolon, kiu aperis en LBE 982. Tie mi iom skizis la vivon kaj komunumajn projektojn de Mramba Simba, vilaĝarestro en Tanzanio.

Por atentigi pri la lastajara Zamenhof-Tago kaj por ĝin taŭge festi, li kun kolego gvidis ses-tagan kurson ĉe la mezlernejo 'Esperanto', kiu troviĝas en la vilaĝo Marambeka, en la distrikto Bunda. Pri tio mi unue eksciis, kiam vekis min frumatene mia hejma telefono: Mramba havas unu-du gramatikajn demandojn, kaj volas doni al siaj lernantoj la eblon iom ekzerci la ĵus lernitajn frazojn kun vera, alilanda esperantisto. Mi do, ne plu dormanta, ĝuis plurajn konversacietojn!

Lastatempe mi aŭdis de Mramba, ke li esperas vojaĝi al Eŭropo en 2019. Li priskribis sian planon, ke li celas prelegi pri siaj komunumaj projektoj kaj pri la Esperanto-movado en Tanzanio, kaj ankaŭ ĉeesti diversajn Esperantajn aranĝojn. Tiel li esperas konatiĝi kun esperantistoj en Eŭropo, vizitante se oportune landajn kongresojn kaj lokajn klubojn.

Mramba petas gastigadon, preferante tranokti ĉe esperantistoj al loĝi en hoteloj. Li estus danka por helpo rilate vojaĝkostojn en Britio, ĉu per trajno aŭ busoj aŭ privataj aŭtoj, manĝojn ktp.

Certe estos bonega okazo por renkonti esperantiston el nekutime fora lando, kies movado sendube meritas

subtenon. Eĉ pli mi esperas, ke vi jam nun, ĉu kiel unuopulo, ĉu en viaj lokaj grupoj, povas komenci pripensi, kiel helpi lian rondvojaĝon kaj eble gastigi lin. Eventuale estus interese invitigi Mramba paroli – kun via akompano – ĉe aliaj, ne-esperantistaj lokaj grupoj, por iom plivastigi lian klientaron – kaj iom reklami Esperanton, kompreneble.

Mramba celas pasigi eble du-tri semajnojn en ĉiu lando. Mi certas, ke pro tempomanko ne ĉiuj grupoj en Britio povos sencohave gastigi lin, sed estus bone havi tiom da pozitivaj ebloj, ke ni devus elekti – kaj supozeble ni provus kunlaborigi proksimajn grupojn, por ke ili 'dividu' Mramba!

Pri precizaj datoj ankoraŭ ne eblas paroli. Mramba vere ŝatus, se eble, partopreni naciajn aranĝojn en la vizitataj landoj – eĉ por tiuj ricevi inviton prelegi. Antaŭvideble do li estus en Britio aprile aŭ maje, se tiam okazos Brita Kongreso, kaj tre probable Britio estus tiam lia unua celo el Tanzanio, antaŭ ol iri al Francio, kaj li certe intencas ĉeesti la germanan kongreson en junio, 2019.

Estus por mi (maljunulo sen saĝtelefono!) tre bonvene, se iu alia dezirus transpreni iom de la kunordiga laboro. Se vi principe deziras kaj povos iel helpi, mi petas vin kontakti min (mjesperanto@btinternet.com) – ju pli frue, des pli bone. Antaŭdankon pro viaj proponoj! ■

KIAM en 1907 oni unue proponis la ideon de Esperanto-mono, la valutoj de multaj landoj baziĝis je oro – la mon-unuo estis difinata kiel egala al certa pezo de pura oro.

Tiel, iasence la mondo jam havis internacian monon, almenaŭ ĝis tiu grado, ke kiu ajn de la tiam cirkulantaj or-enhavaj moneroj havis fiksitajn kaj facile rekoneblajn valorojn en alia lando.

Tamen, oni proponis la Spesmilon. Tiun monon, ne-surprize, oni ankaŭ difinis surbaze de oro. La specifigo estis tia ke, en ekvivalento je oro, 10 Spesmiloj egalas 1 Britan Suverenan.

Do, kiom valoris tiam unu Speso? Nu, la Spesmilo valoris je dekon de pundo, do 2 ŝilingojn aŭ 24 malnov-pencojn. Tiel unu Speso = 24/1000 malnov-pencojn, do proksimume 10 spesoj = 1 fartingon, aŭ kvaron-malnov-pencon.

Tio unuavide ŝajnas absurde eta monsumo por la Speso, sed pensu, ke antaŭ la Unua Mondmilito unu pajnto da biero kostis nur 3 malnov-pencojn (3d). Tiel por unu pajnto da biero vi estus elspezinta 125 Spesojn.

Kiom kostus hodiaŭ tiu biero en Spesoj? La or-enhavo de la Suvereno (la moneroj ankoraŭ elstampiĝas ĉe la Reĝa Stampejo en Kimrujo) valoras proksimume £230. Tiel unu Spesmilo = £23, kaj unu Speso 2,3 nunajn pencojn – kaj (tamburado!) se oni prenas la koston de pajnto da biero je £3, tiam hodiaŭ via biero kostus 130 Spesojn.

Ĉu ne eta miraklo, kiam oni konsideras la

inflacion (mon-valoro-perdiĝon) kiun oni spertis en Britio ekde 1907. Kaj ĉu ne argumento por revivigi la Spesmilon?

Kompreneble, se oni elektus alian varon por fari komparon inter la tiama kaj la nuna prezo en Spesoj, oni eble ricevus alian rezulton. Estas multaj faktoroj, kiuj havas influon sur la koston de specifa varo – ŝanĝoj en teĥnologio, en la produkto-metodoj, en la proporcio kiu estas labor-kosto, ktp.

Sed ĉu vi povas trovi modernan valuton, kiu ne perdis enorme sian valoron de kiam proponiĝis la Spesmilo?

Eble vi krios ke la prezo de oro estas mem ne-stabila, do tiel or-bazita valuto same ne estus stabila. Kaj vi pravas, ke ekde 1971, kiam oni fine rompis la ligon inter oro kaj la dolaro kaj ĉiuj valutoj 'ekfloris', la prezo de oro en dolaroj kreskis forte. Tiam \$35 por unco, nun \$1300.

Sed jen filozofia problemo: ĉu oro plivaloriĝis aŭ ĉu la dolaro senvaloriĝis?

Indas re-legi la saĝajn vortojn de la ekonomikisto David Rikardo, kiu jam en 1817 diris 'La sperto ... montris, ke nek ŝtato nek banko iam havis la liberan povon eldoni paper-monon sen fi-profiti de tiu povo'. Por ĝisdatigi tiun penson oni devus etendi ĝin al la kreo de elektronika mono, sed la principo restas.

Sed ĉu la esperantistoj povus realigi orbazitan monon, do revivigi la Spesmilon? Jes, kaj tio estus multe pli simpla ol vi eble imagus. En sekva artikolo mi esploros tiun temon, kaj montrus kiel procedi. ■

POST KIAM mi ĉeestis mian unuan Esperanton renkontiĝon – SES en Slovakio en somero – mi sciis, ke mi volas ĉeesti pliajn tiajn aranĝojn. La tuj posta estis la *Junulara E-Semajno* (JES) en Pollando kaj dum multa tempo la penso partopreni kuŝadis en mia menso, sed mi nur ekmemoris kiam komenciĝis la kristnaskaj ferioj, kaj mi haste petis subvencion ĉe la *Norviĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo* (NoJEF) kaj aĉetis miajn flugbiletojn, nur kelkajn semajnojn antaŭ la unua tago de la evento.

Dum alteriĝis la flugo mi sentis min iomete maltrankvila; ne pro flugtimo, sed pro tio, ke mi neniel estis certa kiel iri de la flughaveno kongresejen. Solviĝis ĉi tiu problemo kiam mi ekvidis alian britan esperantistinon, Ariel. Eksciinte pli pri la vojo mi tamen restis maltrankvila, ĉar nenian ideon mi havis, ĉu mi havos lito en la kongresejo. La konfirma retpoŝto neklare informis, ke ‘verŝajne lito estos malokupata’ - ja ne vortoj, kiuj forigus novulan maltrankvilon! Bonŝance almenaŭ unu

La *Junulara Esperanto-Semajno* estas novjara aranĝo, kiun unuafoje partoprenis en Ŝĉecino, Pollando **Tyron Surmon** (1-a artikolo) kaj **Georgo Ordish** (2-a).

lito ja estis libera kaj povis do pace komenciĝi la kongreso.

La unua kuriozaĵo estis, ke ĉi tiu malfermo ne okazis la unuan tagon. Ŝajne por doni al pli da homoj la okazon partopreni ĝin, la organizantoj decidis oficiale malfermi la eventon la duan tagon. Do kial ĝuste la organizantoj informis aliĝintojn, ke ili alvenu la 26-an de Decembro – je tago, kiun mi tre ŝatus pasigi kun miaj familianoj – kaj diris nenion pri tio, ke komenciĝos la aranĝo la postan tagon, mi tute ne komprenas. Restis do malmulto por fari, krom paroli kun aliaj tro obeemaj homoj, kiuj ankaŭ venis tro frue, kaj esplori la urbon. (Mi nun bone komprenas, kial Ŝĉecino ne troviĝas sur turismaj mapoj.) Estis evidente, ke mi povus veni unu tagon pli malfrue sen risko, ke mi maltrafu ion ajn.

La programo – kiam ĝi finfine okazis – estis plena kaj interesa. Mi spektis prelegon pri kiel maŝinoj tradukos lingvojn, kaj alian pri kiel malkovriĝos novaj planedoj. Mi partoprenis kvizojn kaj eksciis – almenaŭ tiel estis promsite – liberigi mian internan beston. Aliaj homoj prezentis siajn vidpunktojn pri kiel starigi sukcesajn renkontiĝojn kaj enkondukon al TEJO, la *Tutmonda*



Esperantista Junulara Organizaĵo. Tiun lastan mi pli ekkonis per stranga situacio, ĉar mi neintence partoprenis ĝian komitat-kunsidon. La fono estas, ke amikino, kiun mi renkontis dum mia antaŭa aventuro en Esperantujo estas la reprezentanto de Danio por TEJO, kaj, ne havante la eblon vojaĝi al Pollando, ŝi petis, ke mi anstataŭu ŝin. Bonintence sed naive mi jesis – ja grava eraro.

Neantaŭsciate de mi, la komitat-kunsido estis seshora aranĝo trans 2 tagoj. Traktiĝis tedaj temoj kiel buĝeto, tri-jara plano kaj aliaj tiaĵoj supozeble gravaj, sed por kiuj mankis ĉe mi sperto kaj esprimkapablo (kaj ankaŭ volo, kompreneble). La sola interesa parto dum ĝi por mi estis, kiam mi ekvidis falantan neĝon tra la fenestro... tamen ĝia libera moviĝado pensigis min ĝuste pro la ironio, ke mi senintence karceriĝis.

La dua tago estis iom pli bona, principe ĉar en la drinkejo aŭdis min plendi iu estrarano, kiu do klarigis al mi la okazintaĵojn kaj tiel helpis al mi kompreni la sekvan diskutadon. Ĉio pasis glate... ĝis la prezidanto subite demisiis. Almenaŭ tio iom buntigis la aferojn.

Kiel ĉiam, la plej bonaj programeroj okazis nokte. Ĝuindis muziko ĉe koncertoj kaj internacia muziknokto (kun internaciaj manĝaĵoj!), umado en drinkejo kaj la gufujo, kaj plej grave la silvestro balo, por bonvenigi la novan jaron, kiel ankaŭ faris vespera bufedo, kie mi dum horoj priparolis politikon kaj historion kun dano kaj franco. Estis surprize por mi konstati ĉe la diskejo, ke

multajn kantojn ŝajnis koni ĉiuj eŭropanoj, krom la britoj. Mi restis veka ĝis la 07:00, kiu estis multe pli ĝuinda eraro ol tiu mia, kiam mi konsentis partopreni komitat-kunsidon!

La sekva tago estis la fina plena kaj, kiel cirklo, ĝi estis simile fuŝa kiel la unua. Necesis moviĝi al alia kongresejo (la ĝistiama estis lernejo kaj bezonis ĝin la infanoj), kiu en si mem ne nepre estus problema, kondiĉe ke ĉio estus bone organizita. Kion fari krom forlasi niajn ĉambrojn kaj transiri al la 10 minutojn for junulargastejo? Sed ni devis dum du horoj atendi ĝis ni finfine eksciis, kien ni iros kaj en kiu ĉambro ni tranoktos. La fina fuŝaĵo videbliĝis kiam nia ok-homa grupo eniris nian ĉambron kaj konstatis, ke en ĝi estas nur 7 litoj. Vi sendube jam divenis, kiu eniris la ĉambron laste kaj do havis la sorton dorminte tri horojn kaj postebrie ekscii, ke ne por li estos lito.

La renkontiĝon mi entute tre ĝuis, malgraŭ la fuŝoj kaj problemoj. Elstarajn homojn mi multajn renkontis, kiujn mi esperas vidi denove, kaj la eventon mi subite sopiris post ĝia finiĝo, kiam mi revenis hejmen kaj ne plu povis en Esperanto (feliĉe pliboniĝinta) paroli. Restas la sekva jaro, ĉu ne? ■



IVO MIESEN

ĈIAM MI aŭdis bonaĵojn pri JES. Sed pri ĉi tiu, mia unua, oni ne povis ĉesi la plendadon. Aŭdeblis jenaĵoj: ‘Ĉu haveblas informoj pri programero pli frue ol unu tagon antaŭe?’ ‘Ĉu nur tiomas la silvestra bufedo? Kontraŭ dek eŭroj?’ ‘Kial mi devas translokiĝi nun, postebrie, lacege kaj duonpakinte?’

Eble ankaŭ mi plendetis. Ja estis surprizo la programo. Ja mankis kvanto kaj kvalito por la bufedo. Ja estis fuŝe translokiĝi post la novjara festado por senprograme pasigi tagon.

Eĉ se pri multo mi sukcesis plendi, ankaŭ pri multo mi sukcesis ĝui kaj ŝajne miaj kunplendantoj same kunĝuis. Ĝenerale la etoso estis vigla, feliĉa kaj esperantista kaj estis tiel almenaŭ iom pro taŭga ejo: katolika loĝlernejo, en kiu troviĝis ĉie portretoj (eĉ pluraj en mia ĉambro) de Don Bosco. Tamen ne (nur) tial bonis la ejo: ĝi taŭgis pro la dormoĉambroj, manĝejo, granda halo kaj lernoĉambroj por diskutoj kaj aliaj programeroj. Ĉio en la sama varma konstruaĵo!

Malgraŭ la malfrua apero de la programeroj, la programtabulo sufiĉe plenis. Mi ne partoprenigis min en tro multajn programerojn por ebligi min malstreĉumi kun amikoj. Sed tiuj programeroj, kiujn mi ja elektis partopreni, estis interesa aro de dancado, diskutado kaj sindefendo.

Per seĝoj kaj kontraŭ karotaj ŝajn-tranĉiloj ni nin protektis dum la sindefenda kurso. Eble tiaj situacioj ne ofte aperos ekster trejnsejnoj, sed la scipovoj espereble uzeblus en malpli afablaj situacioj kaj la sperto certe estis amuza.

En same vigla tamen malpli fizika programero gvidita de Bertilo Wennergren, ni diskutis kaj plendis pri la difektoj de Esperanto. (Ne ĉiuj dum-JES-aj plendoj temis pri la aranĝo mem!) La diskutadon komencis Jorge Camacho per sia ege taŭga poemo *La difektoj de Esperanto*. Resumo de la sesio estas, ke Esperanto estas fuŝa lingvo, kiu mirakle bone funkcias.

Malmirakle ne funkciis la samvespera



kaj iom samtempa okazo de la internacia vespero kaj la trinkomanĝa vespero. Komenciĝis unue la trinkomanĝado. Multiĝis la manĝaĵoj, multiĝis la homoj. Sed antaŭ ol okazis malmultiĝo de homoj aŭ de manĝaĵoj aŭdiĝis 'Venu homoj! Komenciĝas la internacia vespero!' Vere malfacilis por la organizantoj fortiri homojn de la bongustaĵoj alportitaj de fremdaj landoj (inkluzive de Veganujo). Vidinte, ke ne ĉiuj volas tuj eniri la ĉefhalon, la organizantoj decidis uzi la manĝaĵojn kiel logaĵoj, kaj portis ilin ĝis antaŭ la scenejo.

La internacia vespero montris, laŭkutime, varian spektakletaron. Inter aliaj estis germana repo, franca komunistaĵo (esperantigita) kaj eĉ la fifama furorkanto *Dek Bovinoj*, tokiponigita. Daŭregis la prezentado sed iam matenete post multega ĉendancado homoj enlitiĝis por ne maltrafi tro de la sekva tago.

Krom la, ja bona, muziko de la internacia verspero, ni povis sperti ankaŭ apartajn koncertojn de pli konataj kaj kelkfoje pli muzikaj muzikistojn. Bedaŭrinde, la muzikisto anoncita, kiun plej antaŭĝojis mi, Martin Wiese, ne povis koncerti. Ĉiuokaze la ludado de Bertilo kaj Birke, la kantado de Jonny M kaj la dancigado de Kimo certe estis pli ol nenio.

Jam mi legis pri steloj, historiaĵa monunujo de antaŭ kelkdekoj da jaroj ne plu uzata en Esperantujo. Dum JES montriĝis, unufoje al mi, novetaj plastaj steloj. Tiujn oni devis uzi por aĉeti ion ajn en la drinkejo. La plasteco ne vere kredigas onin pri ilia valoro kaj tio multe

helpas la elspezadon. Tamen mi sukcesis ne forpagi ĉiujn stelojn por ke mi povu ilin montri al amikoj hejme kaj mokiĝi pri mia sekto.

La silvestra festado mem ege bonis, kaj certe plej unikas el miaj jamaj novjaraj festospertoj. Neniam antaŭe mi festis tiom da fojoj ene de tagnokto novan jaron. Oni ne tediĝis pro la ĉiuhora anonco pri nova novjaro; fakte male, kaj iom kompreneble, ju malpli frue des pli festema, feliĉa kaj ebria. Helpegis al la etoso ne nur furoraĵoj de ĉiuj landoj, sed ankaŭ ĉiulandaj kiĉaĵoj.

Por ĉi tiu aranĝo mi decidis memzorgi kaj do estis bona okazo por profiti de mia ĵus ekhavita lerteco pri studentmanĝoj. Ne estis multe da provizoj por la memzorgantoj; estis nek kuirejo nek fridujo, sed ni sukcesis 'kui' tuj-nudelojn per bolakvo kaj sukcesis 'fridigi' per fenestrobreto, kiu tenis niajn manĝaĵojn en la ekstera pola vintro. Malfeliĉe, kiel rekompenco la vento formanĝis de ni iom da ĉokolado.

Post kelkaj tagoj de memfaritaj manĝoj iĝis pli allogaj la lokaj polaj restoracioj ol la penso refoje manĝi legomojn kun kikerkaĉo, do urbocentren ni esploris kaj trovis belan etejon, kie ni sukcesis satige manĝi eĉ malmultkoste antaŭ ol uzi la okazon por malkovri niajn ĉirkaŭaĵojn, ekster la muroj de la aranĝo, per la mirinda tramsistemo.

Eĉ se oni multe plendis pri fuŝa organizado, la JES en Ŝĉecino multe plaĉis al mi. Klaras, ke la organizintoj multe laboris kaj antaŭ kaj dum la semajno. Kiom mojosa estus 'bonorganizita' JES? Jam mi antaŭĝojas ekscii! ■

Esperanto-tago en Conwy ege ĝuindis

URBESTRO **Bill Chapman** malfermis la pordegon de la Guildhall kaj invitis enen dudek kvin homojn por festi Esperanton. Kun helpo de sia edzino, **Pat**, li preparis du salonegojn la 21an de oktobro, en kiuj gvidis sesiojn **Jack Warren** kaj **Tim Owen**.

Post plaĉa lunĉo en loka

restoracio kaj malgraŭ la pluvego falanta surkapen, li ĉiĉeronis la partoprenantojn laŭ la mezepokaj muroj. Reveninte ĝishaŭte malsekaj al la Guildhall, la grupo ĝuis pluajn sesiojn kaj finis la tagon tre kontentaj pro la tre bona evento al kiu invitis ilin la urbestro. ■



Surhavante siajn oficialajn vestaĵojn, **Bill Chapman** bonvenigas partoprenantojn al la evento, kiun li starigis por festi Esperanton en la Guildhall, Conwy.

Partoprenas diskutsesiojn pri diversaj aktualaĵoj **Damon Lord, Harry Barron, David Nightingale** kaj **Bill Chapman**.



Malmulte estas sciata pri Kartvelio kaj ĝia popolo, Eric. Vi tute pravas.

Se homoj kapablas nomi kartvelon, temas kutime pri la sama. Cetere, ĉi tiu unu — Stalin — ŝajne parolis Esperanton. Laŭ unu biografio li fondis klubon; en alia nefinita biografio legeblas, ke li lernis en malliberejo. Li ne, kiel tragike sciata, restis entuziasma pri Esperanto tamen.

Kie komenciĝis la ideo verki libron pri lando tiel nekonata? Mi kreskis maldekstremulo en tre dekstrema lando kaj tempo, kaj unu tagon eksciis, ke iam ekzistis lando, kian mi volus vidi:

socialisma sed ne akceptante kiel pozitivan la sovetan modelon. Ju pli mi esploris, des pli mi adoris: Kartvelio estas la unusola lando en kiu marksisma partio plenumis demokratran socialisman revolucion en la tuto.

Do alian sistemon havis Kartvelio?

Kiam? Jes, ĝuste. En la 20-a jarcento estis pluraj eksperimentoj en la regado de laboristoj. Abdikis la caro en 1917, kaj poste komenciĝas la regado de la bolŝevistoj. Deklaris sian sendependecon Kartvelio en 1918. La lando estis baldaŭ okupata de la germanoj kaj, post

Post pli ol tridek jaroj da esplorado la usona ĵurnalisto kaj historiisto **Eric Lee** publikigis libron pri la mallongviva sendependa Kartvelio. Tradukis ĝin **Renato Corsetti** kaj ĝi nun haveblas en Esperanto.

la finiĝo de la unua mondmilito, de la brita armeo. Malgraŭ pluraj provoj de komunistoj fari ŝtat-renverŝon, Kartvelio restis sendependa de 1918 ĝis 1921, kiam okupis la landon la rusa armeo, laŭ ordonoj de Stalin, la kartvelo, kiu poste starigis sovetan regadon.



Kaj neniu sciis pri tio? Dum la sovetaj jaroj tute ne eblis agnoski tion, kio okazis antaŭe, ke ekzistis alternativo al la tiea sistemo. Eĉ kvaronjarcento post la falo de Sovetio apenaŭ estas sciata la historio, tiel longe forgesita ĝi estis.

Kiel okazis, ke la libro rapide estis tradukita en Esperanton? Ĉar mi mem estas esperantisto, kaj konas **Renaton Corsetti**, kiu afable konsentis traduki ĝin. Unue ĝi tradukiĝis en la kartvelan; ja natura kaj kontentiga afero. Ke Esperanto estas la dua lingvo tre plaĉas al mi; libro pri universala reformado en la universala lingvo. ■

La eksperimento: la forgesita revolucio de Kartvelujo 1918-1921, 250 paĝoj, Eric Lee, Renato Corsetti (trad.) disponeblas ĉe amazon.co.uk, bookdepository.com kaj aliloke kontraŭ £10.

LA ANGLAN version de ĉi tiu libro mi legis, kaj vere ĝuis, antaŭ mia esperantistiĝo. Biografiojn mi tre ŝatas kaj ĉi tiun mi trovis sur biblioteka breto ĉe mia tiama universitato. Pli ol tri jardekojn poste kaj nun esperantisto mi eksciis pri la reeldono de la longe malhavebla Esperanto-versio kaj tuj aĉetis ĝin je nekredeble bona prezo, kiam ĝi aperis ĉe Amazon: £10 inkluzive de afranko.

Kia pli bona maniero pli profunde koni la movadon kaj lingvon ol legi libron verkitan de eminenta verkistino pri la iniciatinto de la lingvo? Mi persone plibonigis mian vortrezoron senfine kaj enamiĝis al Marjorie Boulton kaj al ŝia skribmaniero. Mi certe aĉetos pliajn ŝiajn librojn.

La dudek tri ĉapitroj de la libro priskribas la tutan vivon de la iniciatinto, grupigante la ĉefajn momentojn de lia vivo, fazon post fazo, ekde la infaneco kaj junuleco en Bjalistoko kaj Varsovio, ĝis la unuaj provoj verki lingvon internacian, la publikigo de la *Unua Libro*, la kvazaŭ nekredebla tuja disvastigo de Esperanto, la unuaj kongresoj, la vojaĝoj de Ludoviko kaj Klara al tiuj kongresoj kaj,


finfine, la lastaj jaroj de lia vivo.

Plaĉas la kvalito fizika de la libro (dikaj paĝoj, klara tiparo, bela kovrilo) kiel ankaŭ la enhava: oni legas pri la rilatoj kun la gepatroj (tiel malsamaj inter la patro kaj la patrino), la subteno kaj amo de la edzino, la suferoj fizikaj kaj ekonomiaj, la multaj malfacilaĵoj de la movado, la konfliktoj... tiu ĉi libro enhavas ĉion.

Mi pasintece legis kaj ĝuis *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat, sed ĉi tiu majstroverko de nia karmemora Marjorie Boulton multoble superas ĝin. Trovi pli bonan kronikon de la unuaj tridek jaroj de la movado, inkluzive de la problemoj, bataloj kaj perfido kiuj preskaŭ detruis ĝin ne estus facile.

Dankon, Marjorie... kaj dankon al EAB pro la reeldono de tiu libro okaze de la centjara jubileo de la morto de Zamenhof, kaj koincide ankaŭ la mortjaro de Marjorie Boulton mem.

Intrigon, perfidon, triumfon, tragedion, militon, amon kaj malamon: la tutan murtapiŝon de la vivo tiu mirinda rakonto de mirinda homo donas al ni. Ĝi sendube taŭgus kiel bazo por grandskala filmo de Hollywood. Spekti tian filmon mi certe rekomendus, sed nepre legu antaŭe la libron! ■



La granda milito kaj Esperanto

Bill Chapman

EN 2018 ni memoras cent jarojn post la fino de la Granda Milito, la unua mondmilito. Lige kun la nuna jaro aperis en Parizo la ampleksa, multfaceta verko *Antaŭ unu jarcento – La granda milito kaj Esperanto*. La libro aperis ĉe la eldonfako de SAT.

Sur la kovrilo de la pli ol 370-paĝa libro oni povas vidi Eŭgenon Lanti, la fondonton de SAT, en franca uniformo. Li dum la unua mondmilito servis kiel ambulancisto – kaj lernis Esperanton. Li estas unu el la kvardeko da aŭtoroj, kies tekstoj formas la libron. Eble plej grava por britaj legantoj estas la longa originala kontribuo de Robert Murray (1897 - 1982), kiun mi persone memoras. Donald Murray retrovis fascinantan manuskripton de sia patro pri spertoj dum tiu milito kaj zorge retajpis ĝin, por ke ĝi aperu la unuan fojon.

En aliaj tekstoj Humphrey Tonkin rakontas pri la travivaĵoj de Tivadar Soros kaj Julio Baghy en siberiaj militkaptitejoj. Mikaelo Bronštejn verkas informoplene pri Vasilij Nikitoviĉ Gasiĉ, kiu lernis

Esperanton en germana kaptitejo per kurso instruita de franca militkaptito. Poste la lingvo helpis al Gasiĉ fuĝi kaj reveturi hejmen.

Temas pri kolektiva verko kun tre bunta enhavo, kaj mi varme rekomendas ĝin. ■



Zamenhof, aŭtoro de Esperanto (342 paĝoj) aĉeteblas ĉe Amazon kontraŭ £10, inkluzive de afranko. Prezo + afranko ĉe EAB kostas £10.50. Ekzemploj je £7.50 aĉeteblos dum la kongreso en Aberystwyth.

Antaŭ unu jarcento – La granda milito kaj Esperanto (376 paĝoj) aĉeteblas ĉe EAB kontraŭ £12.50 + afranko.

Ludemuloj ludas per Esperanto

Kelkaj ludemuloj kunvenis ĉe farmbieno por pasigi semajnfino ludumante. Kial *ludumante* kaj ne simple *ludante*? Ĉar ili ne simple ludis — en Esperanto, kompreneble — sed ankaŭ tradukis instrukciojn en lingva projekto.



Pretiĝas por semajnfina ludado **Tim Morley, Simone Davies, Sammy Kennedy, Ali Mecham, Gavan Fantom, John Parkinson** kaj **Andy Davies**.

Pasis la temp' ebligas instrui pri Esperanto-kulturo



Estis temo
kaj muziko
Tim Morley
John Parkinson
ludas ludojn
furorkartojn
Deklaro



Jukaj piedoj venis kun instrukcioj jam tradukitaj. Ne neces traduki la karton, sur kiu estis skribitaj 'Esperantujo' kaj 'pasporto'.



po por ludoj zikumado. orley kaj arkinson a fifaman ronzanon Bovinoj.

Kartoj kontraŭ Esperantujo ebligis esti iom kreema pri Esperantaĵoj. La kartoj por la ludo Fluxx estis plene tradukitaj kaj presitaj en Esperanto. Multaj aferoj en la ludo rilatas al la lingvo.



Do, kio estas la baza ideo de Ekparolu!? Temas pri servo, kie *genevoj* (komencintoj) kaj *geonkloj* (speciale trejnitaj spertuloj) babilas per Skajpo.

Kio instigis vin fari tion? Mi konstatis havi multajn eblojn skribi, legi kaj aŭskulti la lingvon, sed ke mankas maniero paroli ĝin. Mi serĉis ilon por plibonigi mian parolkapablon kaj vortrezoron kaj ĉe *Ekparolu!* mi trovis solvon ankoraŭ pli bonan ol mi atendis, ĉar la kunparolantoj estas spertaj esperantistoj, kiuj afable donas sian tempon por helpi novulojn.

Kiel one povas aliĝi al la projekto? Sufiĉas viziti la retejon de edukado.net, sub kies aŭspicoj ekzistas la projekto. Alklaku la ligilon 'Ekparolu!', kaj ĉe la paĝfino alklaku 'Aliĝi kiel nevo/nevino'. Farinte tion, restos por vi kelkaj testoj solvendaj, por konfirmi vian nivelon.

Ĉu ĉiuj povas fariĝi genevoj? La genevoj devus havi bazan nivelon de Esperanto, ekzemple esti finintaj la Duolingo-kurson. Sukcesaj genevoj rajtas je 10 konversaciaj sesioj kun maksimume 10 spertuloj. La sesiojn

Kiel paroligi novajn lernantojn? **Maurizio Giacometto** trovis novan manieron babili kun spertuloj.

peras Skajpo, kaj la genevoj kaj geonkloj povas per iu sistemo aranĝi kunvenan momenton por babili.

Kiel ofte vi kunbabilas per Ekparolu!? Mi faras du sesiojn semajne, laŭ konsilo por progresantoj de la organizantoj. Por komencintoj ili rekomendas nur unu sesion. Tiel la novaj lernantoj havos sufiĉe da tempo antaŭ la sesio por prepari diskutotan temon kaj poste povas trankvile digesti, kion en ĝi ili lernis.

Vi do rekomendas Ekparolu!, ĉu ne? Al ĉiuj, ĉu novuloj, ĉu spertuloj. Ankaŭ la duaj povus ricevi gajnon el tiu projekto, se, ekzemple, ili ne havas multajn eblojn por paroli Esperanton. Fariĝante geonkloj tiuj homoj povas paroli pli ofte kaj konservi en bonega stato sian Esperanton. Ĉiuj miaj geonkloj estis aparte afablaj kaj mi rimarkis, ke ili vere volas helpi min plibonigi mian scion kaj uzon de la lingvo. Cetere, la konversacioj estis tre interesaj kaj mi tute ŝatis lerni pri aliaj esperantistoj tra la mondo kaj ekkoni novajn amikojn en Esperantujo! ■

Maurizio Giacometto duan fojon lernis Esperanton en 2017 per Duolingo. Li unuafoje renkontis la lingvon ĉe altlernejo kaj kompletigis baznivelan kurson. Li bedaŭras, ke li preskaŭ neniam uzis Esperanton dum la intertempaj tridek jaroj.

NE MANKIS kursoj por lernantoj je ĉiaj niveloj en la lastaj monatoj. Barlastono gastigis studentojn por la kutima duopo *Lernu* kaj *Lernu Plu*, kiujn sperte gvidis **Ian Carter** kaj **Jack Warren**.

Evidentiĝis, ke lernantoj kontentas pri *Lernu Plu*, ĉar kelkaj revenis post pluraj jamaj vizitoj! Feliĉe por ili EAB starigis sesion de *Postplu* en Londono je nivelo multe pli taŭga por ĉi tiuj progresintoj.

Samtempe kiam tiuj lastaj estis en ĉambro ĉe la YMCA Club en Londono kunvenis tri tute novaj lernantoj kun **Anna Lowenstein** en apuda ĉambro por gustumi unuafoje Esperanton. Raportas pri *Postplu* **Martin S Taylor**:

SABATAN MATENON malgranda grego da lernantoj kunvenis en Londono por serĉi ĉambreton en la kuniklejo sub la YMCA en meza Londono. Ili venis progresinte lerni Esperanton preter la nivelo taŭga por *Lernu Plu* por partopreni kurson 'PostPlu'.

Komence **Tim Owen** petis nin paroli pri kelkaj 'imponaj fotoj', kiujn ni kunportis. Jen bela maniero ebligi nin paroli pri ĉiutagaĵo. Ni pridiskutis foton de la Berlina Murego kaj ankaŭ foton de la murego inter Israelo kaj Palestino. Plaĉa ekzemplo estis foto, kiun kaptis la teleskopo Hubble; ene de unusola foteto troviĝis centoj da galaksioj, ĉiu el kiuj havis pli ol cent miliardojn da steloj. Ja tia foto, kiu forprenas onian

parolkapablon; ironie por diskutgrupo eble, sed bele ĉiaokaze. Alikiale mirinda estis malnova foto de tri junaj aŭstraj soldatoj kun hundo, kiuj aperis al ni tre afablaj – ĝis rivelis la kunportinto, ke unu estas la junaĝa Adolfo Hitlero!

Post tagmanĝo en proksima trinkejo, ni revenis por paroli pri kelkaj tiklaj punktoj de Esperanta gramatiko, por kelkaj lacigaj, por aliaj pensigaj.

Posta diskuttemo celis, ke ĉiu sciigu ion pri si surprizan. Maurizio malkaŝis, ke li estas ĉampiono de kvizoj, kaj ke li aperis sur televido plurfoje. Eble unu tagon li aperos kun sia verdstela kapuĉjako por reklami Esperanton! Mia deklaro neniel estis tiel utila: mi priskribis la okazon kiam antaŭ tridek jaroj mi maskvestis min kaj pasigis la tutan tagon en mia laborejo meze de miaj kolegoj, kaj neniun rekonis min, eĉ kiam mi demandis, ĉu iu scias kien malaperis Martin.

Post pluaj du horoj da diskutado kaj lernado finiĝis la sesio kaj ni al drinkejo iris por kunveni kun lokaj esperantistoj, ebligante al ni paroli en verviva situacio kun spertaj parolantoj.

Laŭ mia takso la tago estis plene sukcesa. Ni havis la okazon paroli pli profunde ol estas eble ĉe *Lernu Plu*, kaj estis bona ideo sciigi nin antaŭe pri la diskuttemoj por ebligi al ni prepari pli komplikajn kaj eksperimentajn frazojn. Mi rekomendas por aliaj kiuj jam sukcesis ĉe *Lernu Plu* kaj bezonas ion plian. ■



Anna Lowenstein kun tri novuloj ĉe porkomencanta kurso en Londono.



Muzikumas **Ian Carter** kaj liaj studentoj ĉe *Lernu*.



Jack Warren kaj studentoj ĉe *Lernu Plu* en Barlastono. Kelkaj en la grupo poste ĉeestis *Postplu* kaj estis tre sukcesaj.



Postpluanoj ripozas: **Maurizio Giacometto, Chris Lewis, Joshua Prettyman** kaj **John Greenwood**

Ĝi naskiĝis antaŭ naŭ monatoj.
Estis mia bela esperanta bebo
Adorinda, ĝi estis nun mia sola strebo.

Mi ne sciis, kial ĝi por mi tiel gravas,
Sed mi sciis, ke mi volas ĝin kreskigi,
Ami, nutri, karesi, refortigi

Kiel bebon mi devis ĝin ja varti.
Je la komenco ĝi ŝajnis rompiĝema,
Sed kun ĉiu tago ĝi povis pli bonfarti
Kaj nun ĝi estas — vere — mem kreskema.

Jes, la bebo restas ankoraŭ strebo -
La defio, vere ja plu ŝanĝiĝanta,
Sed mi nun scias, ke mia iama bebo
Per mil amikoj fariĝos esperanta.

Plendoj pri la muzo

Paul Roberts

Sklavo al kapricoj de la muzo
Estas ambicio de l'poet'

Mokas ŝi la pledojn pro trouzo
Dum soife suĉas ni ĉe la fluet'

Sed subite ŝutas per abunda
varmo ŝi dum noktomez-vigilo

Kiam ni en sonĝa dorm' profunda
Kuŝas ronke kaj, ve, sen skribilo

Iu firmao volis dungi novan kontiston. Fine ili havis mallongan liston kun nur tri kandidatoj.

La unua kontisto eniris la ĉambron. Ili demandis al tiu: 'Kion faras du plus du?' La kandidato respondis: 'Kvar, ĉu ne?'

La dua kontisto eniris. Ankoraŭfoje ili demandis: 'Kion faras du plus du?' La kandidato same respondis: 'Kvar, ĉu ne?'

La tria kontisto eniris. Denove ili demandis: 'Kion faras du plus du?' La kandidato respondis: 'Kion vi volas ke ĝi

faru?'

Ili dungis la trian.

Solvo de paĝo 35

■ Karlo, ŝipa krozo, 100.
60. Patrino, Mikeo, familia manĝo, 40. Nevo,
teatraĵo, 70. Frato, Bertilo, helikoptera vojaĝo,
Edzo, Emilia, balonflugo, 50. Filino, Margareta,





Partoprenantoj de la Esperanto-Tago en Conwy en oktobro: David Nightingale, John Parkinson, Harry Barron, Anica Page, Wynne Jones, Tristan Lord (kun flago), Angie Mariano Lord, Oliver Keeble, Damon Lord, Tim Owen, Sammy Kennedy, Lenio Marobin, Cariana Lewis, Elf Lewis, Chris Lewis, Christine Jones, urbestro Bill Chapman, Jack Warren, Howard Edwards, Terry Page